

附子 (ぶす)

狂言記 外五十番巻三の四
登場人物：大名、太郎冠者、次郎冠者

大名 (長袴 (ながかま)、小さ刀 (ちいさな)) 「此辺 (このあた) りの大名で御ざる。今日は (こにた) さる方 (か) へ参る、太郎冠者を呼び出 (い) し申付 (まうし) る事がある。太郎冠者有 (ある) か。」

太郎冠者 (半袴 (はんかま)、腰帯 (こしおび)) 「はあ。」

大名 「おたか。」

太郎 「御前に。」

大名 「念ふ早かった。次郎冠者も呼べ。」

太郎 「畏 (かしこ) くて御ざる。次郎冠者、召すは。」

次郎冠者 「心得た。御前に。」

大名 「なんじらと呼ば出すは別 (べ) の事でない。今日 (け) はさる方へ行 (ゆ) く、兩人ともに留守をせい。」

二人 「畏て御ざる。」

大名 「それに待て。」

二人 「はあ。」

主 (腰桶 (こしおけ) を持ち出る) 「やい、此 (こゝ) あなたに附子 (ぶす) が有程 (あるほど) に、そふ心得 (こゝろえ) 。」

太郎 「それならば、兩人ともに御供致しませう。」

大名 「そふではない、此あなたに附子と言ふて毒が有、この方から吹く風が当たってさへ滅却 (めつじやく) する程に、そふ心得。」

二人 「畏て御ざる。」 (大名を見送る)

太郎 「やい〜次郎冠者、今日のような御留守は有まいぞ。」 (座る)

次郎 「おふ〜、そなたが供に行 (ゆ) ば身どもが留守をする、身どもが供に行ばそなたが留守をする、今日のやうな言ひ合 (あ) せた留守は有まいぞ、

Akonito

el “Kyoogenki GaiGozyuuBan” vol. 3.4
tradukis SIMATANI Takesi 2017

Sinjoro: (Kun longa kamiŝimo kaj mallonga glavo) Mi estas Sinjoro en ĉi tiu loko. Hodiaŭ mi ekskursos kaj ion ordonos al la servistoj. Mi voku: Kie estas Tarookazya?

Tarookazya: (Kun KYOGEN-stila kamiŝimo kaj zono) ♪ Jen!

S: Kie vi estas?

T: Antaŭ vi!

S: Bone! Venu ankaŭ Zirookazya.

T: Laŭ via ordono! Zirookazya! Tuj venu!

Zirookazya: ♪ Jen, antaŭ vi!

S: Mi havas ion ordoni: Hodiaŭ mi iros ekskursi. Vi ambaŭ bone gardu la domon dum mia foresto.

Ambaŭ: Laŭ via ordono!

S: Tie atendu momenton!

Ambaŭ: Jes, Sinjoro!

S: (Alportas nigran tinon) Ĉi tie mi metis akoniton. Restu for kaj gardu vin.

T: Jes, ni ambaŭ estos akompanantoj kaj gardos vin.

S: Vi eraras! Ne akompananto, sed akonito, la plej danĝera veneno. Eĉ vento de ĝia direkto tuj pereigos vin. Nepre restu for dum gardado.

Ambaŭ: Laŭ via ordono! (S-ro foriras)

T: Hej, Zirookazya! Hodiaŭ strange ni restas hejme. (eksidas)

Z: Kiam li iras kun vi, mi restas hejme. Kiam li iras kun mi, vi restas hejme. Hodiaŭ strange ni ambaŭ restas hejme! Ve, Danĝere!

そりゃあ。」(と、飛びのく)
 太郎「何事じゃ。」
 次郎「附子の方から風が来た、爰(こゝ)にて話せ。」(座る場所を変える)
 太郎「身どもはあの附子を見やうと思ふ」
 次郎「やくたいもない事を、をけ。」
 太郎「あの方から吹く風が当たらねば苦
 しくない、あをいでくれ。」
 次郎「心得た。」
 太郎「あをげ〜。」
 次郎「心得た、ぬかるな。」
 太郎「ぬかる事ではない、さあ、紐(ひも)は解いたぞ、扱(さ)蓋(ふた)を明きよ
 ふほどに、あをげ。」
 次郎「心得た。」
 太郎「扱蓋を明けたぞ、身どもはあの附
 子を見て来(こ)う。」
 次郎「一段とよからふ。」
 太郎「やい〜、見て来たは。」
 次郎「いかやうな物じや。」
 太郎「何じゃは知らぬが、黒い物がどっ
 みりとして有、むまそうな物じゃほど
 に、身どもは食ふてみよふ。」
 次郎「やくたいもない事を、をけ。」
 太郎「身どもは附子に領じられたか、食
 いたふてならぬ、行て食て来う。」
 次郎「身どもがゐるからは、やる事はな
 らぬ。」
 太郎「へ名残の袖(そで)を振り切りて、
 へ附子のそばへぞ歩み行。」(食ふ)
 太郎「む〜。」
 次郎「やい太郎冠者、何とした。」
 太郎「砂糖じゃ。」
 次郎「何じゃ砂糖じゃ。」
 太郎「中〜。」
 次郎「どれ〜。」
 太郎「まづ食ふてみよ。」
 次郎「心得た(なめる)、まことに砂糖
 じゃ。」
 太郎「これを食べすまいと思ふて、附子じゃ

(Iras al Ponto)
 T: Kio okazis?
 Z: Vento venis de ĝia direkto! Ni
 babilu ĉi tie. (Residas en alia loko)
 T: Mi nun volas vidi tiun akoniton.
 Z: Kion vi diras! Ne faru absurdaĵon.
 T: Vento pereigos min. Vi do kontraŭ-
 ventumu, dum mi vidos ĝin!
 Z: Bona ideo!
 T: Ventumu, ventumu! (Iras ŝtelpaŝe)
 Z: Ventumas, ventumas!
 T: Malligos, malligos! Jen, mi malligis
 la tinon! (Retroiras) Mi do forigis la
 kovrilon. Vi ventumu forte!
 Z: Konsentite!
 T: Jen, mi forigis la kovrilon! (reiras)
 Nun mi vidu la enhavon.
 Z: Bone. Vi vidu la enhavon
 T: Jen, mi vidis! Mi ja vidis!
 Z: Kion vi vidis?
 T: Ion nebule nigran kaj masivan.
 Ĝi ŝajnas bongusta. Nun mi volas
 manĝi akoniton.
 Z: Kian absurdaĵon vi eldiris!
 T: Jam mi estas obsedita de akonito.
 Nepre mi iru kaj manĝu ĝin!
 Z: Ne faru absurdaĵon! Mi ne lasos
 vin iri! (kaptas la manikon.)
 T: ♪ Forskuinte la manikon, ♪ mi
 rapidu al akonito! (manĝas)
 T: Toleri mi ne povas!
 Z: Ve, Tarookazya! Kiel vi sentas?
 T: En la tino estas... sukero!
 Z: Ĉu sukero?
 T: Jes, sukero!
 Z: Ankaŭ mi volas manĝi.
 T: Ankaŭ vi povas manĝi.
 Z: Mi manĝos... Vere ĉi tio estas
 sukero!
 T: Por forigi nin de la sukero, Sinjoro

の毒だのとおしゃった。」
次郎「なんぢばかり食てよいものか。」
太郎「それならば、ちとやらふ。」
次郎「そのように取らずとも、ちっと取れ。」
二人「扱(きと)むまい事かな。」(中を見る)
太郎「ほゝを、よい事召さった。頼ふだ御方の、附子じゃの毒じゃのとおしゃったに、『皆お食やった』と、頼ふだ御方の、お帰り被成(なされ)たらば、申上ぐる。」
次郎「身どもが『をけ』と言ふたに明けた、それがしがまっすぐに申上ぐる。」
太郎「やい〜、これはじゃれ事じゃ、此言ひ分けは、あの掛け物を破ればよい。」
次郎「心得た、さらり〜。」
太郎「よい事を召さった、あれは頼ふだお方の牧谿和尚の墨絵の観音で、ご秘蔵だ人の被成(なされ)たものを、あのやうに召さった、御帰りなされたら、きっと申上ぐる。」
次郎「『破れ』と言ふたによって破った、身どもが申上ぐる。」
太郎「やい〜、これもじゃれ事じゃ。」
次郎「さて、此言ひ分どもは何とするぞ。」
太郎「この台天目(だいてんもく)※も割れば言ひ分がたつ。」
次郎「いかな〜、また迷惑をさせうで。」
太郎「身どもも手をかける、そちらを持って。」
次郎「心得た。」
太郎「ぐわらり。」
次郎「ちん」(二人笑う)
太郎「扱お帰りなされたらば、泣いてみよ。」
次郎「泣けばよいか。」
大名「只今罷り帰る、やい〜戻ったぞ。」

diris, ke ĝi estas akonito.
Z: Ne manĝu vi sola. Donu ĝin al mi.
T: Iomete mi donos al vi.
Z: Ne manĝu tiel multe! Transdonu ĝin al mi.
Ambaŭ: Bonguste!(vidas en la tinon)
T: Vi ja faris: La tino estas tute malplena! Sinjoro deadmonis nin de la tino, ĉar en ĝi estas veneno. Kiam li revenos, senkaŝe mi diros, kion vi faris.
Z: Vi mem malfermis la tinon, kvankam mi malaprobis! Mi diros ĉion al Sinjoro!
T: Mi ŝercis! Por senkulpigi nin, disŝiru tiun bildon en la tokonomo.
Z: Volonte mi disŝiru. Riĉ-raĉ, riĉ-raĉ!
T: Vi ja faris! Tio estis altvalora bildo de Avalokiteŝvaro tuĉe pentrita de fama Bonzo MOKKEI. Kiam revenos Sinjoro, senkaŝe mi diros, kion vi faris.
Z: Vi mem ordonis disŝiri la bildon! Mi diros ĉion al Sinjoro!
T: Mi ŝercis ankaŭ ĉifoje!
Z: Kiel ni senkulpigu nin, kiam revenos Sinjoro?
T: Nun, volu disrompi ankaŭ tiun tason de TENMOKU KUN SUBPLADO.
Z: Kia absurdaĵo! Tian trezoron mi ne povas disrompi!
T: Ĉifoje mi helpos vin; ni kune disrompu la tason.
Z: Mi do volonte disrompu!
T: Krak, krak!
Z: Kraŝ! (Ambaŭ ridas)
T: Kiam revenos Sinjoro, ni ploru kun senĉesaj larmoj.
Z: Mi do ploros!
Sinjoro: Hej, mi estas hejme!

太郎「泣け〜。」

大名「心許ないが何事じゃ。」

太郎「次郎冠者、申上げ。」

次郎「わごれ、申し上げませ。」

太郎「お留守を大事と存じて、次郎冠者と相撲(すま)を取りましてござれば、次郎冠者は手取りで御ざり、わたくしが小股を取ってこかしますを、こけまいと存て、掛け物に取り付いたれば、あのやうになりました。」(二人泣く)

大名「これはいかな事。あれは身どもが秘蔵の観音をあのやうにしをった。」

太郎「返しざに天目の上糸投げられまして、あのやうに微塵になりました。」

大名「これはいかな事、をのれを何としたものであらふぞ。」

太郎「かやうに大事の御道具を損ないまして、生(い)けてはおかせられまいと存(ぞん)じて、附子を食べて死のふと存じて、くだされたれども、まだ死にませぬ。」

大名「おのれら今の間に滅却しよふぞ。」

太郎「へ一口(ひとくち)食へども死なれもせず。」

次郎「へ二口食へども死なれもせず。」

太郎「へ三口四口。」

次郎「へ五口六口。」

二人「へ十口(とち)あまりみなになるまで食ふたれども、死なれぬ命めでたさよ、なんぼう…」

大名「やい、そこなやつ。」

次郎「はあ。」

太郎「これは何としたものであらふ。」

大名「まだをのれはそれにをる。」

二人「許さっしやれ〜。」(逃入る)

大名「やるまいぞ〜。」(終わり)

※ 床の掛け物: 床の間に吊るした絵や書。

※ 台天目(たいてんもく): 天目台にのった天目茶碗。黒い鉄釉をかけた陶器。

※ ~: おお返し、くの字点。※ へ: 歌記号、いおり点。※ る: 二の字点、ゆすり点。

T: Li revenis! Ploru, ploru!

S: Kio okazis? Kial vi ploras?

T: Vi klarigu ĉion al Sinjoro.

Z: Ne mi, sed vi klarigu.

T: Mi do klarigos: Dum via foresto ni luktis sumoon. Zirookazy a kaptis min ĉe brako kaj levis mian piedon. Mi faletis, kaptis tiun kakemonon en la tokonomo kaj tiel... disŝiris ĝin! (Ambaŭ ploras)

S: Ha, vi disŝiris altvaloran bildon de Avalokiteŝvaro!

T: Li ĵetis min sur la tason de TENMOKU. Kaj disrompis ĝin!

S: Vi ja disrompis la tason! Kio estu via puno?!

T: Ĉar ni estis certaj, ke vi ne lasos nin vivaj, ni volis morti kaj manĝis la venenon nomatan akonito. Ni tamen ne mortis kaj ankoraŭ nun vivas.

S: Akonito certe mortigos vin!

T: ♪ La unua manĝo ne mortigis nin.

Z: ♪ La dua manĝo ne mortigis nin.

T: ♪ La tria, la kvara,

Z: ♪ La kvina kaj la sesa manĝo...

Ambaŭ: ♪ Eĉ la deka manĝo ne mortigis nin, dum malpleniĝis la tino kaj restas ni tute sanaj.

S: Vi restas tute sanaj?! (batas)

Z: Pardonon!

T: Senkulpigo ne sukcesis!

S: Kiaj ruzuloj! Trompuloj!

Ambaŭ: Pardonon! (Forkuras)

S: Mi ne pardonos vin! (fino)

※ Bildo en tokonomo: Bildo aŭ kaligrafajo en niĉo por eksponaĵo.

※ TENMOKU KUN SUBPLADO: Nigra taso kun fera (nigra)glazuro kaj Subplado.